

Drinku

ni

po

glaso!

Internacia ĉetabla kantareto

**Internacia Festivalo**

**eldonita de Mikaelo Bronŝtejn, Rusio, 2005-2006**

© 2007 (IF / M.Bronŝtejn)

## **VIVU LA STEL'**

(esperanta)

Plenigu la glason, ho ĉiu bonul',

Vivu la verda stel'!

Kaj kantu la homoj el ĉiu angul',

Vivu la verda stel'!

Refreno: Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel'!

Vivu la, vivu la, vivu la stel'!

Vivu la stel', vivu la stel',

Vivu la verda stel'!

Plenigu la glason kaj tostu kun ni,

Vivu la verda stel'!

La lingvon kreitan por ĉiu naci',

Vivu la verda stel'!

Refreno.

Per voĉoj de nia kunbatalantar',

Vivu la verda stel'!

Resonu la voĉoj sur tero kaj mar',

Vivu la verda stel'!

Refreno.

## **Se trinkas vinon vi**

(germana)

Se trinkas vinon vi, atentu la jaron!

Se kisas inon vi, atentu la jaron!

Ĉar estas grave – kaj ĉiam prave:

Maljuna vin' - sed juna belknabin'!

## **Foje ĉe l'Rein'**

(germana)

Foje ĉe l' Rein', kaj sola kun la amatin',  
Foje ĉe l' Rein', en luna lum' ĉe glas' da vin',  
Foje ĉe l' Rejn, la tuta mondo via gajn!  
Kaj ridas kor' en ĉiu hor',  
Kaj la dolor' jam estas for!  
Do, amik', iam ajn - venu al Rejn'!

## **Trinku, trinku kunul'**

(germana)

Trinku, trinku, kunul' -  
hejme nun restu ĉagren';  
Trinku, trinku kunul',  
for de ni plendo kaj ĝen'!  
:,: Zorgojn evitu,  
dolorojn eĉ pli,  
vivo ja ridas al vi!

## **Ho kiel bone agrable**

(hebrea)

Ho, kiel bone, agrable  
Sidi gefratoj kune –  
Jen plezuro, kun geamikoj kune.

Hine ma tov uma naim  
**Ŝevet aĥim gam jaĥad.**

## **Ebriiĝis mi plene**

(rusa)

Ebriiĝis mi plene,  
Ne retrovos mi hejmon.  
Pado gvidis min, longe gvidis min  
En ĉerizan ĝardenon.

Jen kukolo kukuas,  
Mian koron ekskuas.  
Diru vi al mi, diru vi al mi,  
Kie kara noktumas.

Se li dormas vojrande,  
Savu lin la Sinjoro.  
Se kun amatin' en la varma lit',  
Punu lin la Sinjoro.

Kial do kun obstino,  
Logas lin fremdulino?  
Estas bela mi, estas bona mi,  
Sed malbona destino.

## **Punĉo venas**

(sveda)

Punĉo venas, punĉo venas  
Dolĉa bon'!  
Glasoj ŝvitas, voĉoj spritas  
En salon'.

Tost' al ĝojmemoroj,  
Por printemp' salut'!  
Ĉiuj tristoj foras  
Dum la punĉa glut'.

## **Ĉe la tabl'**

(franca)

Ĉe la tabl', karaj geamikoj

Trinku ni – estas bona vin'!

Ĉe la tabl', karaj geamikoj

Trinku ni – estas bona vin'!

Trinku ni – jes, jes, jes!

Trinku ni – ne, ne, ne!

Trinku ni – estas bona vin'!

Se la vino al ni tre plaĉas,

Trinkas ni ĝin ja kun plezur'.

Se mi mortos mi volas resti

En la kel' kie estas vin'.

Du piedoj kontraŭ la muro,

Kaj sub kran' estu mia kap'.

## **Verda ponteto**

(pola)

Verda pont' sur torent' tuta tremas,

Ĉar sur ĝin vento mem herbon semas.

Se pri tiu pontet' mi disponus,

Mi ĝin nur per herbar' bele kronus.

Ornaminte per flor' ĝin ĉe fino,

Mi promenus laŭ ĝi kun knabino!

## **Mi tentiĝis**

(litova)

Mi ne drinkus tute, jes, ne drinkus, ne - (2-foje)

Estis plena la pokalo – mi tentiĝis! (2-foje)

Mi ne dancus tute, jes, ne dancus, ne – (2-foje)

Bele ludis la muziko – mi tentiĝis! (2-foje)

Mi eĉ ne parolus, ne parolus, ne – (2-foje)

Estis belaj la okuloj – mi tentiĝis! (2-foje)

Kaj mi ne promenus, ne promenus, ne – (2-foje)

Hele brilis la plenluno – mi tentiĝis! (2-foje)

Mi ne kiskus tute, jes, ne kiskus, ne – (2-foje)

Arde brilis ŝiaj lipoj – mi tentiĝis! (2-foje)

Kaj mi ne kuŝiĝus, ne kuŝiĝus, ne – (2-foje)

Estis mola la litaĵo – mi tentiĝis! (2-foje)

## **Gajaj bierfarantoj**

(estona)

Bierfarante kantas ni: - Hej-sa kaj hej-sa!

Bier' fermentas en la kel' – Hej-sa kaj hej-sa!

Biero ŝaŭmas en barel' – Hej-sa kaj hej-sa!

Mi scias, ke baldaŭ do pretos ĝi –

Ektrinkos ni, ektrinkos ni!

Biero ĉiam freŝigas min –

Bonsanon mi trinkas al vi – Ho-hej!

Vi estas Juhan, kaj mi estas Enn,

Ĉiujn vojfojtojn faligos ni nun.

## TRINK-KANTO

(latva-esperanta)

Drinku ni po glaso  
Kiam junas ni,  
Iam en oldeco  
Restos ni sen vin'.

Dormu en vojrandoj  
Kiam junas ni,  
Iam en oldeco  
Plie taŭgos lit'.

Amu ni knabinojn  
Kiam junas ni,  
Iam en oldeco  
Restos nur edzin'.

Lernu Esperanton  
Kiam junas ni,  
Por la tuta vivo  
Ĉiam taŭgos ĝi.

## La kristala glaso

(ukraina)

Se eksidos ni por noblaj faroj,  
se eksidos ni ĉe la barel', -  
venu tiam turkoj kaj tataroj, -  
ĉio, fratoj, estas bagatel' !

Refr: La kristala glaso, randa arĝent'-  
drinku, aŭ ne drinku, viv'-moment'  
La arĝenta fundo, glasa kristal', -  
drinku, aŭ ne drinku, -tutegal' !

Jen eksidis ĉe la glas' amikoj:  
Petro, Paŭlo, Nikolao mem, -  
nur gustumis tiun ĉi brandaĉon, -  
tuj forgesis ĉiuj pri l' eden'!

Ja ne drinkos brandon vi sub tero,  
mankos same kaj bier' kaj vin'.  
Nur rezino bolos en infero...  
Drinku, drinku fratoj ĝis la fin'!

Kaj, se venos ostulin' malbona,  
venos kun falĉilo tien ĉi,  
al ŝi diros mi: - Saluton, onjo!  
Drinku, mia kara, nun kun mi!



## Hej, vi plenigu...

(ukraina)

Hej, vi plenigu  
Altajn pokalojn  
Por fluu vin'  
Super randoj,  
Por ke la vivo  
Al ni bonŝancu  
Kaj riĉe vivu la lando.

Ĵetu sur teron  
Ni malfeliĉon,  
Por estu nur bonaj faroj.  
Trinku por sorto,  
Por la bonfarto,  
Trinku por ĉio plej kara.

Trinku, karuloj,  
Trinku la fratoj,  
Trinku, ĉar ni tion povas.  
Ĝis ne subpremis  
Nin iu plago,  
Kaj la feliĉo nin trovos.

## **Amikoj, drinku nun kun agrablo**

(franca)

Amikoj, drinku nun kun agrablo,  
Amikoj, drinku nun kun ĝu',  
Sed ni nin ne trovu kuŝantaj sub tablo...  
Amikoj, drinku nun kun agrablo,  
Amikoj, drinku nun kun ĝu'.

Aminjo, ni nin arbaren direktu!  
Ni iru en arbaron de l'reĝ'!  
Ni ĉarmajn violojn en kuno kolektu –  
Aminjo, ni nin arbaren direktu!  
Ni iru en arbaron de l' reĝ'!!

Karulo, vi mian rozon ne havos,  
Ne havos vi la rozon, karul'  
La pastro paroĥa ĉi tiun ja savos –  
Karulo, vi mian rozon ne havos,  
Ne havos vi la rozon, karul'!

Mi ŝatas ŝinkon, ŝatas kolbason,  
Ŝategas mi ŝinkon, ho jes!  
Sed de l' nutristino preferas mi lakton –  
Mi ŝatas ŝinkon, ŝatas kolbason,  
Ŝategas mi ŝinkon, ho jes!

## Malfermitaj ĉardoj

(hungara)

Denove malfermitaj ĉardoj  
Sattrinku uloj, ni sen mor'  
Ektondru drinkokant' kun ardo  
Pro ĉio ĉi ĝojegas kor'

Ni ree sidas kiel iam  
Biero fluas gut' post gut'  
Kaj revas koroj, ke por ĉiam  
Eterne daŭru glassalut'

Ĉu endas vere ion ŝpari  
Ĉu certas vi pri sekva tag'  
Rabisto povas vojon bari  
Aŭ venos eĉ pli aĉa plag'

Fordrinku speson post la speso  
Glastinto kaj bareltamtam' -  
Solakompan' al kant' senĉesa  
Pri grandfeliĉ' kaj arda am'!

## **Minca sorpo**

(rusa)

Kial, sorpo minca  
Vin venteg' ŝancelas,  
Al baril' remiza  
Vian kapon premas?

Tie trans la vojo  
Ĉe l' rivero flua  
Staras alta kverko,  
En solec' enua.

Se mi trans la vojon  
Venu al la kverko,  
Min ne plu ŝancelus  
La kolera vento.

Sed ne povas sorpo  
Al la kverko iri .  
Estas ŝia sorto –  
Dum ŝancel' sopiri.

## Mi eĉ pereu fiafate

(rusa)

Mi eĉ pereu fiafate, -  
Ho jes, amik', sed, ve' amik'!  
Ĝis tiu horo akurate  
Plu drinkos mi, plu drinkos mi.

Drinkante tristas kaj festenas,  
Forĵetas ĉion el la kor',  
Kuraĝe mi pokalon prenas, -  
Kaj plagon for! Kaj plagon for!

Ebrio estas mia sorto,  
La timo fuĝas de l' ebri'.  
Nenia plej diabla forto  
Ĝeniga estas do por mi.

Ne luksan jakon, nur kitelon  
Mi vestas por la bonhumor',  
Vatitan havas mi ĉapelon  
Por ne turmentu kapdolor'.

Nun estas mi duonebria,  
Mi ofte rememoras vin.  
Larmeto laŭ ruĝvango mia  
Forfluas el okula sin'.

Mi revenadis frumatene,  
Drinkinta ĝis la gaja stat',  
Kaj mi kleriĝis plej konvene  
En la cigana fakultat'.

Sinjoroj, en rutina maro,  
Blankadas unusola vel'...  
Adiaŭ, nelavita lando!  
Vi brilu, brilu, mia stel'.

## Laŭdkanto al brando

(sveda)

En jar' mil sepcent sepdek sep -  
Kantu fa-la kaj kantu fa-la-la –  
Drinke estis tuta sek' –  
Hej, kantu hop fale-rala-lej!  
En jar' mil sepcent sepdek ok –  
Senmodera brandostok'!

Forĝist', staranta ĉe la fajr', -...  
Lia estos brandsalajr'...  
Ĉar nigras li pro fulgo,  
Pindon donu sen indulgo.

Muelist' ĉe muelil', -...  
Havu likvon el distil'...  
Jes, ĉar blankas li farune,  
Litron donu oportune.

Ŝuisto ĉe la botoŝtip', -...  
Sentu Brandon sur la lip'...  
Jes, ĉar li la ŝtipon uzas,  
Li la drinkon ne rifuzas.

Ĉiuj uloj en vilaĝ', -...  
Hurau pro la avantaĝ'...  
Jen sufiĉa estas brando –  
Nun feliĉas tuta lando.

## **Iĉjo edziĝis**

(jida)

Iĉjo fine venis al edziĝ'!

Iĉjo fine venis al edziĝ'!

Kisu, kara, kisu min –

Rajtas vidi la patrin', -

Iĉjo fine venis al edziĝ'.

Ruĝan vinon trinku por feliĉ'!

Ruĝan vinon trinku por feliĉ'!

Dolĉa estas ruĝa vin',

Dolĉe ke mi amas vin, -

Iĉjo fine venis al edziĝ'.

Granda mono estas bagatel'!

Estu ĉefe pomoj kaj miel'!

Estu sano, estu pan',

Kaj infano post infan'!

Iĉjo fine venis al edziĝ'.

## **Kafo**

(pola)

Kafo, kafo, kafo,

Kafo, trinku ĝin.

Sen kafo en sino

La vivo rutina,

Kafo, trinku ĝin.

Konjak', konjak', konjak',

Konjak', trinku ĝin.

Se mankas konjako,

Do vivo en flako,

Konjak', trinku ĝin.

*[daŭrigu sekvapaĝe]*

**Kafo**            *[daŭrigo]*

(pola)

Vino, vino, vino,  
Vino, trinku ĝin.  
Sen kisoj, sen vino  
Ne cedas knabino,  
Vino, trinku ĝin.

Ĥato, ĥato, ĥato,  
Ĥato, havu ĝin.  
Sen domo en ver', do –  
La vivo en merdo,  
Ĥato, estu ĝi!

Ino, ino, ino,  
Ino, havu ŝin.  
Sen ino por viro -  
Frenezo, sopiro,  
Ino, havu ŝin.

Bebo, bebo, bebo,  
Bebo, havu ĝin.  
Rapide ĝin faru  
Sen helpo najbara,  
Bebo, havu ĝin.

Kanto, kanto, kanto,  
Kanto, estu ĝi.  
Ja vivo sen kanto –  
Eŭnuko-amanto,  
Kanto, estu ĝi!



## **Knabineto arbareton iris...**

(pola)

Knabineto arbareton <iris kun la ĝoj'> 3-foje  
Kaj renkontis ĉasisteton <sur la sama voj'> 3-foje

Ne estas la strato, nek tiu hejm',  
Ne estas knabino amata plej.  
Mi trovis la straton kun kara hejm',  
Mi trovis knabinon amatan plej.

Ĉasisteto-samvoĵano, mi salutas vin,  
Vi ricevus buterpanon, sed mi manĝis ĝin.

Se vi manĝis, do vi manĝis, ne incitu min,  
Se mi havus bastoneton, tuj mi batus vin.

Knabineto-ĉarmulino, mi salutas vin,  
Ne la pano estas grava, sed la am sen fin'.

## **Saluton denove!**

(E. Puĥova – M. Bronŝtejn)

Ekstaru, amikoj, por glasa ektinto -  
saluton denove !  
La jaron lacigan akceptis pasinto -  
saluton denove !  
Kaj venis finfine la hor' sopirata -  
saluton denove !  
Tintigu la glasojn en rondo gefrata  
kaj trinku je bona hor' !

*[daŭrigu sekvapaĝe]*

## Saluton denove!

[daŭrigo]

(E. Puĥova – M. Bronŝtejn)

Do venis nun tempo nia  
por ĝoja tostad' feria.

Glaskoj enronde

tintu tutmonde

je nia bona hor' !

Ja, kiam sopiras ni, do -

ni revas pri tiu rido,

pri tiu nuno,

pri nia kuno

tiom da tagoj for!

Ni levu la glasojn, ja vokas alflug' la -

en rondo amika -

bonega ĉampano kaj ŝaŭma kaj glugla -

en rondo amika -

la tostajn parolojn plenigu enhavo -

en rondo amika -

por sano kaj bono, por ĝuo kaj ravo

ni trinku je bona hor' !

Do venis nun tempo nia

por ĝoja tostad' feria.

Glaskoj enronde

tintu tutmonde

je nia bona hor' !

Ja, kiam sopiras ni, do -

ni revas pri tiu rido,

pri tiu nuno,

pri nia kuno

tiom da tagoj for!